Verkada gruplaboro en Trondheim

Verkis kaj posedas la kopirajton:
Jardar Eggesbø Abrahamsen
Judith Parelie Abrahamsen
Torstein Kvakland
Arne Olav Mjøen
Herman Ranes

Tasko 1

Rolulo:	6. Senhejma infano
Loko:	6. En urba parko
Tempo:	7. Tuj post granda tondroŝtormo
Situacio/defio:	8. Iu alia sentas ke li/ŝi volas cedi (ne plu eltenas la situacion)

Iam estis sesjara knabeto vagante sub la altaj arboj en la grandega parko en la same grandega urbo.

Sed tiun tagon ankaŭ estis bela vetero, kaj la suno brilis, kaj la aero estis sufiĉe malseka pro la hieraŭa tondroŝtormo, kiu malsekigis la grundon profunde.

La ĝardenoj plaŭdetis kiel marĉoj.

La knabeto tremis, ĉar li sciis ke liaj gepatroj kuŝis sub tiuj ĝardenaj marĉoj, ĉar li mem murdis ilin kaj enterigis ilin.

Li fuĝis antaŭ la infaninspekcio, kaj devis dormi ekstere dum la pasintaj semajnoj.

Li malsekis, li frostis, malsatis kaj estis tre laca kaj elĉerpita pro la fizika foslaboro.

Oni devas sufiĉe profunde fosi por enterigi personojn. Sed li estis nur malgranda knabo, kaj devis forte labori.

La bona feino provis konvinki la infaninspekcion ke la knabeto estas senkulpa.

Tamen subite la infaninspekcio kaptis la feinon. La labora inspekcio malpermesis al la infaninspekcio plu labori, pro la danĝero reprezentata de tiu omena infano.

Kaj se vi promenas en la parko, vi povas ankoraŭ aŭdi la tremantan sonon de la malfeliĉa infano.

Tasko 2

Mia patrino estas tre miopa virino.
Mi supozas ke ŝi eĉ ne vidas siajn dentojn.
Tial mi volis donaci al ŝi okulvitrojn kaj artefikajn dentojn.
Pro tio ŝi neniam pardonos min.
Mi nur levas miajn ŝultrojn, sed timas ke tio ne helpas.

Sur la internacia nivelo la kuracistoj avertis kontraŭ enlitiĝo, pro miopo kaj la malbonaj dentoj.
Ĝis nun tio tamen estis la plej bona kuraco, kvankam ekzistas alternativa medikamento konsistanta el zingibraj radikoj miksitaj kun suko de citrono.

Ĉar mia patrino ne ŝatas zingibron, nek litojn, ŝi devus pli volonte ĝoji pro mia donaco. Nedankema bestaĉo.